

## LECIONO 13

### Gramatiko



– **end** – суффикс, обозначающий долженствование, необходимость, обязанность: *subtenenda* ideo – идея, которую необходимо поддержать; *farenda* laboro – работа, которую нужно сделать (выполнить); *aĉetenda* lernolibro – книга, которая должна быть куплена;

– **uj** – суффикс, имеющий несколько значений:

1) для образования наименования предмета, в котором что-либо хранится, вместилища чего-либо: *lakto* (молоко) – *laktujo* (молочник), *lavi* (мыть) – *lavujo* (умывальник);

2) для образования наименования страны, в которой проживает преимущественно одна нация: *Francujo* – Франция, *Ĉinujo* – Китай. Сейчас более употребительным для образования наименования страны является суффикс **-i-** или слово *lando*: *Britio* – Великобритания, *Koreio* – Корея, *Pollando* – Польша;

3) для образования наименования плодового дерева или кустарника: *citrono* (лимон) – *citronujo* (лимонное дерево), *romo* (яблоко) – *romujo* (яблоня), *gozo* (роза) – *gozuj* (розовый куст);

**la** – определённый артикль является неизменяемым служебным словом одинаковым для всех родов, падежей и чисел и ставится перед именами существительными или другими словами, играющими роль существительных.

#### Он употребляется:

1) если речь идёт об определенном предмете или лице, известном или ранее упомянутом: *La sperta instruisto pri Esperanto en la ŝtata universitato*. Опытный преподаватель (учитель) эсперанто в государственном университете. – *Jen strato*. *En la strato staras domoj*. *La domoj estas multetaĝaj*. Вот улица. На улице стоят дома. Дома – многоэтажные.

2) перед названием объектов единственных в своём роде: *La Suno*. Солнце. *La Tero*. Земля. *La Luno*. Луна. *La ĉuvaŝa kaj la tatara estas la lingvoj de la popoloj, vivantaj ĉe Volga*. Чувашский и татарский являются языками народов, живущих у Волги.

3) если речь идет о предмете (лице) в единственном числе, представляющем весь класс или категорию предметов (лиц): *La besto (ĉiu) havas kvar piedojn*. Животное (каждое) имеет четыре ноги. *La papero estas blanka, sed la neĝo estas pli blanka*. Бумага – белая, но снег белее.

4) перед именами собственными, с определяющим прилагательным или существительным: *la Balta maro* – Балтийское море, *la Suda Ameriko* – Южная Америка, *la antikva Romo* – Древний Рим, *la rivero Volgo* – река Волга, *la venonta dimanĉo* – следующее воскресенье, *la reĝo Salomono* – царь Соломон,

la larĝa Dnepro – широкий Днепр, la nekonata Ivanov – неизвестный Иванов, la fama Anna Pavlova – знаменитая Анна Павлова.

5) при обозначении дат: Mia avino alvenos la 28an de februaro. Моя бабушка придет 28 апреля. La solena ceremonio okazos la 14an de julio. Торжественная церемония состоится 14 июля.

6) вместо личного местоимения первого лица: Mi levas la manon (mian manon). Я поднимаю руку (мою руку, т.е. свою).

**Артикль не употребляется:**

1) перед названием языка эсперанто;

2) перед именами собственными: Eva, Irina, Aleksandr, Ivan, Volter, Stradivari;

3) перед титулами, степенями, званиями и словом «господин» и т.п., если они примыкают к имени собственному: Docento Petrov. Доцент Петров. Sinjorino Ebel. Госпожа Эбель.

4) перед названиями стран и городов: Rusio. Hispanio, Nov-Jorko, Ho-Ŝi-Min-urbo;

5) при обращении к одному или к нескольким лицам. Geamikoj! Lernu Esperanton! Друзья! Изучайте эсперанто!

Гласная – **а** – в артикле может быть заменена апострофом в целях благозвучия: L'arbaro estas bela. Лес – красивый. Ni vagas tra l'mondo. Мы бродим по миру.

Рассмотрение некоторых других случаев (не)использования артикля отнесено в курс эсперанто повышенного уровня.

## **Taskoj**



***I. Tralegu la tekston «Letero de Lena» kaj dividu ĝin je senchavaj partoj.***

### **Letero de Lena**

Mia amata paĉjo,

jam pli kaj pli da sekaj folioj falas sur teron en la parko. Vento pelas ilin, kaj Miĉjo ludas per ili. Venis laboristoj kaj konstruas varman lignan dometon por ĝi. Ankaŭ mi vestis varmajn ŝtrumpojn.

Ni ofte vizitadas Miĉjon. Preskaŭ ĉiutage post la lecionoj. Ni edukas ĝin. Ĝenerale, Miĉjo estas bona lernanto. Imagu paĉjo, ĝi tre ŝatas muzikon, dancas kaj eĉ provas kanti! ĝi jam komprenas multajn vortojn, ekzemple: «peco da sukero». Se mi demandas: «Ĉu vi volas sukeron?» – ĝi kapjesas. Mi demandas: «Kiom da pecoj mi havas?» – kaj mi montras du. La saĝulo Miĉjo dufoje batas teron per piedo! Ĝi povas kalkuli ĝis kvin, sed post kvin ĝi ofte eraras. Sed ni atingos nian celon – Miĉjo nepre kalkulos ĝis dek. Ni donas al ĝi kelkajn sportajn taskojn. Jen – ĝi povas paŝi nur per du malantaŭaj piedoj! Kaj turni ringon per la rostro. Tio ja estas vere videnda!



nigraj okulvitroj

Onklo Maksim venigis en la parkon iun universitatan profesoron. Ŝajnas, ke el iu orienta lando. Mi konfesu, ke mi ne ŝatas lin. Li portas dikan paperujon, sed li neniam uzis paperojn el ĝi. Li kaŝas la okulojn post nigraj okulvitroj. Li pli ofte parolas pri mono, ol pri scienco. Ial mi opinias, ke nia oĉjo Boĉjo konas kaj timas la profesoron.

Ankaŭ tiu kataĉo Graf... Ĝi ne volas paciĝi kun Klajd, ĝi ŝtelas viandon... Kvankam ĝi bone kaptas musojn...

Ni vivas normale. Nur tempo ne sufiĉas por ĉio. Iom da libera tempo restas vespere por spekti televidon aŭ por legi. Panjo aĉetis por mi belan robon kaj jupon kun butonoj.

Panjo kaj mi – ni deziras al vi sukcesan vojaĝon tra fremdaj maroj. Ni atendas vin. Ankaŭ la familio de Marko. Ankaŭ Miĉjo.



robo

Mi kisas vin forte  
Lenjo.

## ***II. Trovu la komencon kaj la finon de ĉiu parto konsiderante la jenan planon.***

1. Alvenanta aŭtuno.
2. Edukado de Miĉjo:
  - a) diversflankaj mensaj sukcesoj;
  - b) sportaj atingoj.
3. Orientlanda universitata profesoro.
4. Malamiko de Klajd.
5. Ĉiutaga vivo de Lena.

## ***III. Tralegu la frazparojn. El ĉiu paro elektu tiun, kiu rilatas al la teksto.***

1. Maksim venigis lernejan instruiston. Maksim venigis universitatan profesoron.
2. Li estas el orienta lando. Li estas el okcidenta lando.
3. Li portas malgrandan valizon. Li portas dikan paperujon.
4. Li pli ofte parolas pri mono. Li pli ofte parolas pri scienco.
5. Klajd ŝtelis viandon. Graf ŝtelis viandon.
6. Ĝi bone kaptas musojn. Ĝi bone kaptas muŝojn.
7. Tempo mankas por ĉio. Tempo sufiĉas por ĉio.
8. Panjo aĉetis por mi belan robon. Mi aĉetis por panjo belan robon.
9. Ni atendas Miĉjon. Ni atendas vin.
10. Mi kisas vin forte. Mi ĉirkaŭprenas vin forte.

## ***IV. Trovu en la teksto frazojn, kiuj priskribas novajn scipovojn de Miĉjo.***

## ***V. Uzante la leksikon de la teksto, traduku skribe en Esperanton.***

Миша играет с сухими листьями, которые падают на землю. Почти каждый день Лена навещает Мишу. Он – хороший ученик. Миша любит танцевать и

пробует петь. Он – умница и не ошибается, считая до пяти. Стоит посмотреть, как Миша выполняет спортивные задания: хождение на задних ногах и вращение кольца хоботом.

**VI. Diru unuvorte, trovante signifon de sekvaj vortoj:**

- 1) jupo, ĉemizo, mantelo – ... ;
- 2) muziko, pentraĵoj, arkitekturo – ... ;
- 3) televido, radio, gazeto – ... ;
- 4) futbalo, teniso, gimnastiko – ... .

**VII. Formu laŭ modelo laŭeble multajn vortojn el la literoj de la sekvaj:** universitato, ekzemple, normale, esperantisto.

**Modelo:** provi – vori, povi, pro, piro, viro, vi.



**VIII. Tralegu fragmenton de la rakonto «Bela» el la libro «Bato» de rusdevena germanino Lena Karpunina.**

**Bela**

... Ni ambaŭ tiam havis dekunu jarojn kaj lernis en la sama klaso. Ŝi (Bela – red.) estis senespere malbona lernantino. Ekzistis neniu fako, en kiu ŝi havis pli malpli akcepteblan noton: eĉ en korpekzercado ŝi «sukcesis» ricevadi negativajn poentojn: dum ludado ŝi ne povis rapide ĵeti la pilkon al la alia ludanto, por ne paroli pri trafo de la pilko en la golejon. Ŝi ne povis trakuri distancon en necesa tempo, ŝi povis salti nek longen, nek alten sen faligi la laton – ŝi povis nenion. Kaj post ĉiu malsukcesa provo ŝi konfuzite svingis la manojn kaj kun kulpa rideto iris flanken... .



**golejo kaj pilko**



**1. Respondu al la demandoj.**

Kiom da jaroj havis Bela? Kia lernantino ŝi estis? En kiu fako Bela havis la akcepteblan noton? Kiajn poentojn ŝi ricevadis en korpekzercado? Kiujn «sukcesojn» havis Bela? Kiel reagis Bela al siaj malsukcesoj?

**2. Komparu sportajn atingojn de mamudido Miĉjo kaj de Bela: kiu el ili estas pli lerta? Kaj kial?**

**3. Rakontu pri viaj sportaj atingoj laŭ jena plano.**

Ĉiutaga matena gimnastiko.

Sana vivmaniero sen malbonaj kutimoj.

Preferata sporto kaj amaskomunikiloj.

Regula trejnado en sportejo (stadiono, sporta halo, naĝejo).

Partopreno en sportaj konkuroj.

Sporto kaj viaj gepatroj (geamikoj).

***IX. Multaj gejunuloj nuntempe sportumas. Sed ne ĉiuj iĝas ĉampionoj. Tamen ili daŭre praktikas sporton la tutan vivon.***

*1. Kompilu frazojn, kiuj respegulas vian opinion.*

		en bona sanstato.
		forta.
Oni sportumas	por esti	eleganta.
		bela.
		svelta.

*2. Demandu vian samkursan(in)on.*

Ĉu li (ŝi) interesiĝas pri sporto? Ĉu li (ŝi) estas sportema? Ĉu li (ŝi) faras matenan gimnastikon? Kiun sporton li (ŝi) praktikas vintre (somere)? Ĉu li (ŝi) povas naĝi? Ĉu li (ŝi) partoprenas sportajn konkurojn? Ĉu li (ŝi) legas sportajn gazetojn (artikolojn pri sporto)? Ĉu li (ŝi) rigardas sportajn programojn en televido?

***X. Helpe de la sufikso –end–***

*a) faru novajn vortojn kaj traduku ilin:* fari, protesti, prezenti, foti, spekti, suspekti, deziri, kolekti, konstrui;

*b) transformu la frazojn laŭ la modelo:*

**Modelo:** Vi devas legi ĉi librojn – ili estas legendaj. Oni devas plani tion – tio estas planenda.

Mi devas aĉeti la skribilon. Oni devas konstrui domon. Karlo devas akcepti gaston. Panjo devas kuiri supon. Ni devas plenumi hejmajn taskojn. Ili devas kalkuli siajn poentojn. Oni devas kompari regulojn.

***XI. Uzante la sufikson –uj–***

*a) formu novajn vortojn (kion ili signifas?) kaj faru frazojn kun ili:* cindro, cigaredo, sukero, papero;

*b) traduku en Esperanton.*

В нашем саду цветут все яблони. В этом году мы соберем со сливового дерева хороший урожай. Будапешт – столица Венгрии. Эсперантида – страна, которой нет на карте. В солонке нет соли. Он забыл свой кошелек дома. В пенале лежали ручки и карандаши. Необходимо убирать спичечные коробки от детей. Пчелы живут в ульях.

***XII. Metu, kie necesas, la difinitan artikolon la. Klarigu ĉiun kazon.***

Mi legas ... libron en ... biblioteko sidante ĉe ... tablo. ... franca kaj ... hispana estas ... lingvoj de ... romana grupo. ... Esperanto estas ... lingvo por ... tuta mondo. Jen ... seĝo. Sur ... seĝo sidas kato. ... kato estas nigra. Estu ĉiam ... ĉielo, estu ĉiam ... suno. ... Adamo kaj ... Eva estas mondfame konataj personaĵoj. Li estas ... doktoro pri historio. ... hundo, kiu bojas, ne mordas. ... Anna kaj ... beleta Manjo promenas

en ... arbaro. ... oro estas ... valora metalo. Antaŭe mi ŝatis ripozi ĉe ... bordo de ... Balta maro.

**XIII. Traduku la sekvajn esprimojn kaj kompilu frazojn kun kelkaj el ili:**

пустая бочка, пустой человек, пустые слова, с пустыми руками, пустая отговорка, пустые мечты, пустая беседа, пустое дело.

**XIV. Voĉlegu la fragmenton de la versaĵo de hungara aŭtoro J. Baghy.**

1. Traduku ĝin helpe de vortaro.
2. Diru, kiujn kvalitojn devas havi vera esperantisto?
3. Parkerigu la versaĵon.

**Estas mi esperantisto**

Verda stelo sur la brusto  
iom palas pro la rusto.  
mi ne estas purigisto;  
estas mi esperantisto.

Gramatikon mi ne konas  
kaj gazeton ne abonas...  
Librojn legu la verkisto;  
Estas mi esperantisto.

Mi parolas kun rapido:  
«Bonan tagon! Ĝis revido!»  
Ĝi sufiĉas por ekzisto;  
Estas mi esperantisto.

Por la venko mi esperas,  
sed nenion mi oferas.  
Mi ne estas ja bankisto;  
estas mi esperantisto.

Post la mort' ĉe tombo mia  
staros «rondo familia»,  
nekrologos ĵurnalisto:  
estis li esperantisto.



verda E-stelo

**Ŝlosiloj al la taskoj**

*Tasko VI*

- 1) jupo, ĉemizo, mantelo – vestoj;
- 2) muziko, pentraĵoj, arkitekturo – artoj;
- 3) televido, radio, gazeto – amaskomunikiloj;
- 4) futbalo, teniso, gimnastiko – sportoj.

### *Tasko XI*

En nia ĝardeno floras ĉiuj pomujoj. En tiu ĉi jaro ni havos bonan rikolton de prunujo. Budapeŝto estas ĉefurbo de Hungarujo. Esperantujo estas lando, kiu mankas sur mapo. En salujo ne estas salo. Li forgesis sian monujon hejme. En plumujo troviĝis skribiloj kaj krajonoj. Necesas kaŝi alumetujojn de infanoj. Abeloj vivas en abelujoj.

### *Tasko XII*

Mi legas libron en biblioteko sidante ĉe la tablo. La franca kaj la hispana estas la lingvoj de la romana grupo. Esperanto estas la lingvo por la tuta mondo. Jen seĝo. Sur la seĝo sidas kato. La kato estas nigra. Estu ĉiam la ĉielo, estu ĉiam la suno. Adamo kaj Eva estas mondfame konataj personaĵoj. Li estas doktoro pri historio. La hundo, kiu bojas, ne mordas. Anna kaj la beleta Manjo promenas en arbaro. Oro estas valora metalo. Antaŭe mi ŝatis ripozi ĉe la bordo de la Balta maro.

### *Tasko XIII*

пустая бочка – malplena barelo, пустой человек – frivola homo, пустые слова – vanaj vortoj, с пустыми руками – kun malplenaj manoj, пустая отговорка – senbaza preteksto, пустые мечты – iluzioj, пустая беседа – senenhava konversacio, пустое дело – negrava (vana) afero